

INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA
:-: PRI ĈIO, KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON. :-:

Sendu ĉion, kio rilatas al la Redakcio kaj Administracio al **W. NUTTERS**, Ostadestraat 94, Amsterdam, Nederlando. :-: :-:

ABONO: jare 1 Sm. (holande: 1 gulden 20 cent), duonjare $\frac{1}{2}$ Sm. Helpabono: jare almenaŭ 2 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko. :-:

Tutmonda organizaĵo de la laboristaro esperantista.

Okaze de la Germana ligotago de G. L. E. A. dum Pasko en Frankfurt a. M., la delegitoj interalie pritraktis la temon: La utilo de internacia unuiĝo kaj la fundamentaj kondiĉoj al tutmonda organizaĵo esp. laborista. La ligoestraro de G. L. E. A. invitis la eksterlandajn asociojn kaj izolitajn grupojn sendi delegitojn al tiu ĉi kunveno por kune kun ili des pli bone pritrakti tiun gravan temon. Sed, bedaŭrinde, ne ĉiuj asocioj sendis delegitojn, nur E. S. F. I. O. estis reprezentata de k do Senrono kaj N. F. L. E. de k do Meijer, 's Hage. Krom tio ĉeestis k-do-ĵoj el Bohemujo, Hispanujo kaj Ruslando, sed ili ne kunportis mandatojn. Post longa parolado, en kiu la parolanto, k-do v. Riesen, Hamburg, traktis la temon, li konkludis, ke jam nun tre bone estus eble fondi tutmondan organizaĵon sur jena bazo: El ĉiu de la nunaj regnoj, pro praktikaj kaŭzoj, nur unu organizo de la koncerna regno sin povus aliĝi al tutmonda organizaĵo. Diversspecaj direktoj, rilate al politika, sindikata aŭ lingva bazoj sin devas unuigi al asocio de la koncerna regno. Ĉar por la laborantaj klasoj, precipe por la laboristoj esperantistaj, ne devus ekzisti tiaj, nur de la ŝovinismo akcelataj lingvodiferencoj, respektive ne devus esti akcelataj. Por la tutmonda laboristaro nur ekzistas sola celo: La efektiviĝo de la socialismo.

Laŭ pagitaj kotizoj po ano kaj jaro (eble 10 sd.) la parolanto proponis: ĉiu asocio ricevos voĉdonrajton en la reprezentaro de tutmonda organizaĵo laŭ jena skalo: ĝis 200 anoj 1 voĉon, 201—400, 2 voĉojn, 401—750, 3 voĉojn, 751—1000, 4 voĉojn, 1001—1500, 5 voĉojn, k.t.p. Laŭ tiu ĉi, sur demokrata bazo

aranĝita voĉdonrajto eĉ la malgrandaj asocioj estus bone reprezentataj.

La sekvantaj parolantoj, k-doĵ Senrono, Paris, Meijer, s Hage, kaj aliaj delegitoj principe konsentis al la proponoj de l' parolanto, kaj propono estis akceptata, kiu komisiis la ligoestraron de G. L. E. A. interrilati kun la eksterlandaj asocioj kaj izolitaj grupoj laboristaj por ke ili sendu delegitojn al la 10a Universala Kongreso 1914a en Parizo, kiuj definitive decidu en kunveno pri tiu ĉi demando kaj por ke oni ekstarigu la tutmondan organizon. Ni nun petas ĉiujn asociojn kaj izolitajn unuigojn ekinterrilati kun la estro de G. L. E. A. k-do Fr. Hegewald, Hannover, Warstr. 7, kaj pro tio, ke ili atentigu la societojn konatajn al ili, pri tiu ĉi temo, por ke ni fine komencu laŭplanan kaj celtrafan laboron por la disvastigo de nia interlingvo.

La Balkanmilito.

III.

La disvolvo de moderna kapitalismo en kelkaj partoj de l' otomana imperio, naskis por tiu imperio nesolveblan problemon. Ĝi nepre devis, por resti staranta, ekokupi sin kun la disvolvo de l' produktivaj fortoj de lando kaj popolo; ĝi devis akceli tiun disvolvon. Sed, tia disvolvo ĉiam vekas inter subpremataj popoloj propran nacian vivon, kaj per tio: reziston kontraŭ la superregado de la fremda nacio. Turkujo do nepre bezonis tion, kio por ĝia ekzistado estos plej fatala. Kaj en la nuna tempo, la turka regado pro tiu antitezo pereas.

Ĉio ĉi povis plenumi sin despli rapide, ĉar, ĝenerale, la Turkoj estas ne nur malplimulto inter la nacioj de l' otomana imperio, sed simple are da burokratoj kaj militistoj, nekapablaj meti sin iel al la kapo de l' moderna disvolvo.

Post la jun-turka revolucio en jaro 1908, la situacio iom sanĝiĝis. La jun-turkoj deziris transformi Turkujon en ŝtaton modernan kun centra aŭtoritato. Tial ĝi devis sin unue okupi kun Albanujo. En montara Nord-Albanujo vivas la montanoj (Malisoroj) sur tre malalta nivelo de socia disvolvo. La loĝantaro dividiĝas en gentoj; la sangovenĝo estas en tiu lando la sola formo de justeco; la submeto al la turka aŭtoritato estas nur ŝajno: la Malisoroj ne pagas imposton, ne liveras rekrutojn, ne toleras turkajn oficistojn, ne obeas

turkajn leĝojn. Ili, tamen, estis longtempe grava apogo por la jam ŝanceliĝanta regado: kiam iu najbara parto de l' turka imperio fariĝis tro maltrankvila, tiam la sultano sendis tien la sovaĝajn, rabemajn, mortigemajn montanojn.

Nu, ŝtato moderna, kian revis fondi la jun-turkoj, kompreneble ne povas toleri, ke granda parto de la lando rifuzas respekti la aŭtoritaton, malatentas la leĝojn, ne pagas la impostojn. Oni do penis submeti la Albanojn al la centra ŝtatpovo. Kun la sola rezulto, ke la albana kerno de l' turka armeo aliĝis al la kontraŭevolucio kontraŭ la jun-turkoj.

En Sud Albanujo la situacio estis alia. Tie la socia stato estis sin multe pli disvolvinta ol en Nord-Albanujo. Terkulturado tie atingis jam altan ŝtupon; estas tie komerco; ekzistas tie urba burĝaro. La turka aŭtoritato tie havis multe pli da influo ol en la Nordo. Sed, per tiu pli alta socia disvolvo naskiĝis tie nacia movado, kiu, tuj post la falo de l' despotismo kaj post enkonduko de parlamenta reĝimo, aŭdigis sin. Ĝi metis siajn naciajn postulojn: albanaj lernejoj, rajtigo de la lingvo albana, la rajto por skribi per latinaj anstataŭ per turkaj literoj; kaj, kiel fina celo: aŭtonomio. La jun-turkoj ne povis permesi ĉi ĉion — libera disvolvo de l' submetitaj popoloj subfosus kaj minacus la turkan perfortoregadon. Anstataŭ cedi, la jun-turkoj ordonis disiĝon de la naciaj organizadoj, ordonis instruon de la turka lingvo, de la arabaj literoj. La Sud Albanoj, siaflanke, facile povis entiri en sian kulturmovadon la militemajn Nord-Albanojn, ĵus mem atakatajn de la jun-turkoj. Kaj tiel tiuj montanoj, ne sciantaj legi nek skribi, postulis inter alie: rajtigon de la lernejoj albanaj, rajtigon de l' alfabeto latina, aŭtonomion de Albanujo.

La albana problemo estis fatala por la turka aŭtoritato. Tiu lasta malvenkis. Tio fortigis la ribeleman movadon en aliaj partoj de l' imperio. Ĉie ja estis malkontenteco — ĉar la jun-turka reĝimo estis por la unuj partoj de l' imperio tro progresema, por la aliaj, kontraŭe, tro reakcia.

La jun-turka ŝtato deziris krei, antaŭ ĉio: uniformecon de politika regado ankaŭ en la malgrand-aziajn regionojn. La unue necesa rimedo por povi tion plenumi estis: konstruo de fervojoj. La fervojo metas la ĉefurbon, la centron de l' ŝtata aŭtoritato, en rekta rilato kun la diversaj partoj de la lando. Ĝi faciligas kontrolon. Ĝi ebligas rapidan transporton de trupoj. Sed, la fervojo samtempe malfermas tiun regionon por la tutmonda komunikado! Ĝi rompas, kaj por ĉiam, la

silenton de ĉi jarcentoj! Kie ĝi aperas, tie ĝi entiras la regionojn, eĉ la plej barbarajn, en la kapitalistan civilizadon! Kie estas fervojo, tie baldaŭ renversiĝas ĉiuj ĥinaj muroj de izolemeo. Ĉie ĝi kaŭzas disfalon de ĉi malnovaj formoj de socia vivado. Kaj dum tia transformo estas ĉiam multaj, kiuj vidas malaperi sian antaŭajn rimedojn de ekzisto, kaj kiuj tial penas ripari la antaŭajn rilatojn.

En ĉio ĉi Turkujo ne faris escepton. En Armenujo, en Kurdistan, en Arabujo la loĝantaro vidis malaperi siajn antaŭajn rimedojn de ekzisto: karavanado, rabado Ĝi falas en mizeron. Kaj penas rezisti. Ĝi rifuzas pagi impostojn; ĝi ribelas kontraŭ la centra aŭtoritato. Tiu ribelo, naskiĝinta el reakciaj motivoj, prenas la formon de batalo por nacia nedependeco — t. e. por libereco por repreni la antaŭajn metiojn: rabado k.t.p.

Tiel la turka regno estas disŝirata de internaj malpacoj. En la nuna periodo de transiro al modern-kapitalista ŝtato, estas en Turkujo neniu klaso, kiu reprezentas tiun disvolvon, neniu sufiĉe forta por ĝin akceli. La jun-turkoj, estas vere, kunportis el okcidenta Eŭropo liberalajn ideojn, sed en la lando estas neniu granda klaso sur kiu ili povus apogi. Ilia regado estas militista diktatoreco; ilia parlamento estas malfora kaj nefidinda, ĉar ĝi estas esprimo de nur malgranda parto el la loĝantaro, ne de iu granda amaso; ili, fine, ne estas kapablaj solvi la problemon: kiamaniere levi la kampistojn el ilian mizeron.

La jun-turka movado estis do granda malsukceso. Estis jam longe klare: Turkujo ne povus rezisti al forta atako. La grandaj potencoj ne povis riski tiun atakon — tion nebligas la fama politiko de *l' status quo*, la intersia malamo kaj konkurenco de ĉi grandaj potencoj. Sed, aperis alia potenco, kiu ĝin entreprenis — tiu alia potenco estas la balkanligo.

(Daŭrigota.)

SOCIA MOVADO.

El Anglujo.

La spirito de la ribelo neniam antaŭe tiom regis nian proletaron, kiom hodiaŭ; ĉie estas strikoj, kaj signoj ne mankas ke la „Horo alvenas“. Tre enuiga estus raporto pri ĉiuj strikoj, ĉar ili estas multaj kaj ĉiaj metioj estas tuŝataj. Nun estas mia opinio, ke mi nur raportos tiujn strikojn, kiuj rekte kaj videble efektas la socian movadon.

La tri plej grandaj malnovaj unuiĝoj de fervojistoj federaciigis en unu granda unio, kiu (mi legas) estas la plej granda en la mondo, de ĉi tiu ni povas esperi la plej bonan, ĉar jam ni vidis la batalemecon de la fervojistoj, kaj la tendenco estas pli progresema ol iam antaŭe.

La ministraro de Anglujo estas akuzita pri spekulacio en akcioj de la Markona senfadena telegraf-kompanio; ĉi tio okazis en la tempo, kiam la registaro intencis aĉeti la kompanion kaj la publikigo de ĉi novaĵo. Kompreneble, ili gajnis multe da mono per tio, kaj antaŭ la enketita komitato malkaŝe estas eltenita la vero. La konfeso de kulpeco estas la plej grava skandalo de modernaj tempoj. La ruĝa ĉiutaga ĵurnalo „Daily Herald“ ricevis bonan anoncon per la lipoj de la ministro Lloyd George, kiu diris, ke tiu ĵurnalo estas „La Limo“.

Sino Pankhurst, ĉef feministino, ĉe la granda juĝejo estis kondamnita al trijara malliberigo. Oni atendas ŝian reaparon antaŭ la publiko dum la nuna semajno 7—14 Aprilo, ĉar jam ŝi estas en la malsanulejo de la malliberejo kiel la rezultato de la malsatanta striko. La militantoj daŭrigas la bruladon k.t.p. kaj ĝuas... ripozon en la malliberejoj.

Kurioza estas la striko de la ŝuistaro el la Pogrande Kooperativa Fabrikanta Societo en Leicester (Lest-r). 3000 strikis kaj aliaj sekvos en Norwich, Northampton, Bristol, Stafford, Leeds, Glasgow kaj aliaj urboj. Oni postulas pli bonajn laborkondiĉojn.

Federaciigo estas la modo inter la metiaj unuiĝoj kaj de ĉie estas raportita tiaj movoj. La mastroj ankaŭ klopodas per novaj taktikoj rompi la konscian forton de la laboristaro. La fervojaj kompanio kaj la registaro penadis formi „nacion fervojistan rezervon“, feliĉe la sukceso estas ĝis nun sen-signifa.

La anarĥiista konferenco. Treege kuraĝiga estis nia konferenco. Delegitoj el Abertillery, Birmingham, Bristol, Durham, Gateshead, Glasgow, Halifax, Hanley, Harlech, Huddersfield, Hull, Liverpool, London, Manchester, Newcastle-on-Tyne, South-Shields kaj Swansea; leteroj de espero kaj kuraĝigo el Belfast, Bournemouth, Coventry, Edinburg, Letchworth kaj Sheffield.

Kiam ni vidas la landkarton kaj ĉi tiujn nomojn, ni vidas kiel bone disvastiĝita estas la angla movado.

Kontraŭ tio ŝajnas paradoksa kiam estas decidata ŝanĝi la nomon de la ĉiusemajna ĵurnalo de la „Anarchist” en „The Voice of Labour” (La Voĉo de Laboro). La kialo, videble, estis: ke la ĵurnalovendistoj timas la nomon, kaj eĉ kelkaj kamaradoj ne ŝatas anonci sin anarĥiistoj per la flirtado de la ĵurnalo. *N o t u b o n e.*

Estis proponate, ke ni sendu saluton al la Nederlandaj anarĥiistoj per Esperantaj vortoj. Unu Nederlandano leviĝis kaj enketis, ĉu k-do Hoyle estis certa pri la okazo de tiu konferenco, ĉar li mem ĉiam regule legis la Nederlandajn anarĥiistajn gazetojn. Nia Hoyle respondis, ke la anonco pri la konferenco estis trovebla en la paĝoj de Int. Socia Revuo kaj rekomendinda estis, ke ĉiu delegato lernu la lingvon kaj legu I. S. R.

Alia raportinda etaĵo. K-do Portet (hispano) donis klarigan paroleton pri la Ferrer moderna lernejo; liaj vortoj pri lia mortigita k-do Ferrer vibrigis ĉiun koron, sed ĝojiga estis lia raporto pri lia kreskado de la lernejoj kaj la Ferrer ideo.

La konferenco ricevis ĉie presistan atenton, de la kapitalista presitaĵoj kaj ruĝaj gazetoj.

ĈEESTINTO.

El Belgujo.


La amasa striko, kiu 14an de Aprilo komenciĝis, estos — diras K-do Louis de Brouckère en la belga organo marxista „La Lutte de Classe” (La Klasbatalado) — nova okazaĵo en la historio de laborista movado; nova laŭ la verŝajna daŭro; nova laŭ la maniero je kiu ĝi estas preparita.

La striko mem ne estas novaĵo. En 1909 okazis en Svedujo striko ĝenerala pro la atakoj de l' kapitalistoj je la sindikatoj, kiujn ili penis neniigi per senfina serio da elŝlosoj. Post sessemajna heroa batalo la proletariaro estis venkata. Sed neniam malvenko alportis tiom da gajno. Ĉar: por la unua fojo en historio la striko ĝenerala, metode gvidita, laŭ antaŭe decidita celo kaj bone disciplinita — estis iĝinta efektivaĵo! Por la unua fojo la striko ĝenerala — pri kies valoro en socialistaj sferoj estis grava dubo — estis paŝinta ekster la regionojn de l' utopio. La laboristoj devis konfesi, ke la striko ĝenerala estas multpova; la klaso reganta estis spertinta je sentebla maniero, kian egan frapon la laboristoj povas doni al kapitalismo, simple per krucigo de siaj brakoj.

Duan ekzemplon prezentis en 1912 Anglujo. Tie la politika karaktero de l' striko estis ankoraŭ pli klare videbla. La ministroj sin turnis al la ŝtato por akiri rajton kontraŭ siaj mastroj. Ili, certe, ne plene venkis; sed, ili devigis la regantojn trakti kun ili kiel potenco konfesita.

Kaj nun, en Belgujo, la amasa striko estas striko politika en la plena senco de l' vorto. Ĉar ĝi direktas sin rekte

La Gigant' en ripozo



(Superan bildon, desegnitajn de A. LUYT, eldonis la belga ĉeforgano socialista „Le Peuple” (La Popolo) en formo de poŝtkarto).

kontraŭ la regantoj, kiuj defendas politikan privilegion de l' klaso reganta. La nuna striko similas neniel nek la tumultajn movadojn en tiu lando en jaroj 1898 kaj 1902, nek la mallongajn politikajn strikojn en Aŭstrujo, nek la strikribelojn en Rusujo. Tiu ĉi striko deziras esti la unua apliko de politika striko laŭ la sama metodo de ekonomia striko.”

„Neniam, skribas belga raportanto de granda holanda gazeto, okazis granda striko, kiu tiom longtempe antaŭe estis anoncita. Naŭ monatoj antaŭe oni decidis striki. Kaj tuj

centmiloj da homoj komencis prepari sin. La devizo estis de tiam: Preparu vin! Sparu! Estu pretaj! Kaj en la karbominejoj — la granda arterio de l' ekonomia vivo de Belgando — oni de tiam rifuzis liveri superprodukon. Tial la kontraŭulo ne povis ŝpari, nek sin prepari."

Al la regantoj nur restas unu espero: ke ili povos dronigi la strikon en sango. Ili kovris la landon per soldatoj, pri kiuj ili ne estas tute certaj, kaj per ĝendarmoj, alkoholizitaj sovaĝuloj, kiuj jam sur multa sanga paĝo de belga historio kun honto estas citataj, kaj pri kiuj la regantoj estas absolute certaj. Sed, la belga proletariaro, esperinde, efektivigos la socialistan idealon de revolucio — ili ne intencas bruligi domojn, nek versi sangon, ili organizas koncertojn kaj legojn, ili vizitas muzeojn; en urbo Mons, unu el la centroj de l' movado, oni tenas kurson pri la historio de l' kanto, kun kunlaborado de famaj kantistoj.

Kaj la najbaraj popoloj helpas laŭ fortoj. En Holando 3000 socialistaj familioj sin prezentis por ricevi unu aŭ pli da infanoj de l' belgaj kamaradoj. Jen gravega paŝo al internacia fratiĝo. La fakto, ke la belgaj kamaradoj fidas al nekonataj eksterlandanoj sian plej karan posedajon — siajn infanojn — tio estas brilanta pruvo, ke la konscio kaj la certeco, ke socialistoj estas gefratoj, jam profunde penetris en la kapojn kaj en la korojn.

Ĉiuj malam koj de socialismo penas ĉiumaniere malgrandigi la signifon de la striko. La klerikalaj gazetoj faras superfortajn klopodojn por konvinki sin mem kaj aliajn, ke tute ne estas striko — la unuan tagon de la striko ili skribis, ke je lundo en Belgujo preskaŭ neniu laboras; kaj de tago al tago ili faras novajn inventojn por klarigi kial en Belgando „kelkaj fabrikejoj kaj minejoj" ĉesis laboron. Aliaj, kies artikoloj eble jam estis pretaj por moki la belgajn kamaradojn, se ili lastmomente decidus ne striki, nun trovas aliajn manierojn por montri kaj esprimi sian malamon.

Sed, la giganto kviete ripozas, ne sin okupante pri la pikoj de l' muŝoj.

20/IV/1913.

El Ĥinlando.

Kion donis revolucio al Ĥinlando. — Jam pli ol jaro pasis de kiam per „imperiestra edikto" (vidu I. S. R. Aprilo 1912, p. 41) en Ĥinlando estis proklamata respubliko kaj estis elektata prezidanto Juanj-Sikaj, Ĥina Washington, kiel oni lin nomis en Ĥinlando, alvokita por

savi de perejo la patrujon. Kion do nun prezentas Ĥina respubliko?

La revolucio komenciĝis pro tio, ke Ĥina popolo estis senrajta kaj kruele premigata de oficistaro de l' Dajcina dinastio. La lando estis senforta kaj malriĉa, la popolo ĉiumaniere rabata, centra registara kasejo malplena. La revoluciistoj, komencante ribelon, proklamis plenan egalrajtecon de ĉiuj nacioj kaj religioj, ekzistantaj en Ĥinlando — Ĥinoj, mandĵuroj, mongoloj, tartaroj kaj tangutoj, budistoj, mahomedanoj kaj kristanoj.

La revolucia ribelo estis gajnata. La revoluciistoj heredis la tutan landon, malplenan kason kaj tutan oficistaron. En lando tute elrabita kaj malriĉigita, oni devis fari reformojn, konvenajn al la nova situacio. La provizora registaro kun nova prezidanto (la antaŭa unua ministro de l' monarĥio) devis kunvoki nacian kunvenon por starigi konstantan Ĥinan konstitucion kaj leĝaron. Sed, ĝis nun tiu kunveno ne estis kunvokata kaj ĝis nun la lando estas regata de malnova oficistaro laŭ la antaŭaj principoj, kaj la popolo kiel antaŭe suferas de arbitrado de oficistaro kaj nur estas, kiel antaŭe, rabata de registaro, kiu ĉiujn impostojn elspezas ekskluzive per pligrandigi armeon kaj por novaj armadoj de lando. Neniu el proklamitaj reformoj efektiviĝis ĝis nun. Antaŭ ne longe estas proklamita leĝo, kiu diras ke la konstituciaj garantioj ne koncernas al mandĵuroj, kiuj estas ekster leĝo kaj ĉiu oficisto povas fari ĉion kun mandĵuro, kion plaĉas al li, ĝis plena konfiskado de havaĵo; jen estas ekzemplo de Ĥina egalrajteco de nacioj.*)

De la unuaj tagoj de ĝia ekzistado la respublika registaro intencis fari alilandan monoprunton por enkondukado de reformoj; por tio la registaro interparolis kun grupo da bankieroj de ses grandaj regnoj. La bankieroj konsentis prunte doni 600 000 000 kaj postulis financon kontroladon en Ĥinlando. La Ĥinaj patriotoj bruegis kontraŭ tia kontrolo kaj registaro forlasis la interparoladon kun bankieroj. Laŭ iniciativo de patriotoj en tuta lando komenciĝis kolektado de monferoj por bezonoj de respubliko. Kiom estis kolektata, oni ne scias, sed nur scias, ke ĉiuj kolektitaj monoj estas elspezitaj por armeo kaj nun Ĥina registaro denove komencis interparoladojn kun bankieroj de ses regnoj pri pruntodono.

*) La antaŭa dinastio devenis de l' mandĵuroj kaj dum ĝia regado la mandĵuroj havis grandajn privilegiojn; nun Ĥinoj (pursangaj) venĝas al mandĵuroj kaj kruele persekutas ilin.

Sed ne nur internaj aferoj embarasas Ĥinlandon. Dum revolucio proklamis la sendependecon du ĥinaj provincoj, Tibetujo kaj Mongolujo. La unua kontraktis pri protektado kun Anglujo, la dua kun Rusujo. Siavice Anglujo kaj Rusujo kontraktis inter si kaj devigis sin reciproke helpi en Tibetujo kaj Mongolujo kontraŭ atencoj de aliaj regnoj sur ĉi tiuj landoj.

La nova ĥina registaro ne deziras konsenti sendependecon de Tibetujo kaj Mongolujo, kaj deziras perforte aligi ilin al respubliko. Jen por tiu ĉi do estas formata la granda armeo kaj elspezataj tutaj monoj. La ĥina registaro febre preparas sin al „puna ekspedicio” en Mongolujon.

Sed tio „puna ekspedicio” neeviteble alkondukos al milito kun Rusujo, kiu kontraktis kun mongola „ĥutuĥta” pri protektado kaj devigis sin defendi mongolan sendependecon kontraŭ la ĥinoj. Komenci la „punan ekspedicion” en Mongolujon la Ĥinoj intencas en la proksima printempo, kaj por tio kolektas armeon en Nord-Mandjurujo. La Rusoj, kompreneble, ankaŭ kolektas sian armeon ĉe limoj de Mandjurujo kaj Mongolujo.

El tiuj ĉi faktoj oni povas vidi, ke la revolucio donis al ĥina popolo nur la nomon „respubliko” kaj prezidenton anstataŭ „bogdyĥan” kaj nenion pli. La lando, anstataŭ disvolviĝi kaj ekonomie progresi, pli kaj pli malriĉiĝas kaj nun la krizo en Ĥinlando atingis altan gradon.

Do, la registaro, anstataŭ fari reformojn de vivo, serĉas militon, kiu povas nur pereigi Ĥinlandon.

Eble, ĉiu leganta en gazetoj pri movado en Ĥinlando, opinias, ke la lando renaskiĝis. Sed tio ĉi ne estas vera. La movado tuŝis nur malgrandan rondon de ĥinoj kaj plej multa kvanto restis sama, kiel antaŭe. Eĉ eksterajo de ĥinoj ne ŝanĝiĝis — nur 1 % vestas sin eŭrope, malgraŭ la ĝenanta penado de registaro eŭropigi la ĥinojn. Ekzemple, en urbeto de Nord-Mandjurujo, Sahaljan, la guberniestro ne donas alilandajn pasportojn al ĥinoj, havantaj harlignon, postulante forigi ĝin, eĉ se tiu homo estus plej honesta.

Entute: la proksima estonteco ne promesas ion bonan por ĥina popolo.

KOMPOSTISTO.

La Internacia Oficejo Socialista en Bruselo ricevis el urbo Shanghai interesplenan leteron pri socialismo kaj Esperanto en Ĥinujo. La intern. sekretario, k-do Camille Huysmans, afable transsendis tiun leteron al redakcio de nia Revuo. Ĝi aperos en la proksima n-ro.

RED.

El Rumanujo.

Laborista agitado. — Dum la hungara kaj belga laboristaro kaj socialistaro plej energie bataladas por akiri universalan voĉrajton, la rumana laboristaro, organizita en sindikatoj kaj socialista partio, troviĝas nuntempe en granda agitado. Post la energia kaj inda batalado kontraŭ la milita kurento, kiu lasta feliĉe nun malpliĝis, la rumanaj laboristoj estas envokitaj militi por la plibonigo de sia sorto, por akiri la vivrajton kaj la liberecĝuadon.

Pasis unu jaro, post kiam la konservativa partio, akirinte la regadopovon, por allogi la amasojn laboristajn, anoncis: ke leĝo por protektado de la laboristoj estos farata. Sed (kiel ĉiuj leĝoj faritaj sen aŭskulti la voĉon de tiuj, kiuj devas ĝui ilin), anstataŭ esti bonfara por la laboristoj, ĝi nur celis enkatenigon kiel eble multe kaj senigon je ĉia libereco.

Oni nomas ĝin: „leĝo por organizado kaj asekurado de laboristoj kontraŭ akcidentoj, invalideco kaj maljuneco”. Jam kiam la leĝoprojekto estis publike diskonigita, oni multe kaj energie batalis por forigi la unuan ĉapitron, rilatantan „la organizadon”, kaj por la ŝanĝo de kelkaj artikoloj en la dua ĉapitro pri „la asekurado”. Sed la voĉo de l' suferantoj ne estis aŭskultata. La reakcio triumfis. Oni nur sukcesis forigi kelkajn artikolojn el la leĝo, ekzemple tiun per kiu oni volis devigi la laboristojn porti signon de ilia metio.

Unu jaron tiu leĝo funkcias kaj ĉiuj laboristoj plene konvinkiĝis, ke ĝi estas nur farita kontraŭ ili.

Se oni ĝin studas, tiam evidentiĝas, ke nesupozebla reakcia spirito ĝin ellaboris. Per la unua ĉapitro oni nur kompletigas la verkon de la pasinta liberala(!) registaro, kiu per leĝo de 1909 malpermesis al la ŝtataj laboristoj organizi sin.

Oni enkondukis la plej abomenajn kondiĉojn, tiel ke la laboristo je ĉiu paŝo falu en kaptulo.

Oni detruis ĉiujn helpkasojn, kiuj ekzistis ĉe fabrikejoj aŭ industriejoj, kaj nun la leĝo estas nur nova kaj peza jugo, kiun devas porti la laboristoj.

Ne malpli malbona estas la dua ĉapitro por „asekurado”. Per ĝi oni limigas la aĝon, kiam oni povas postuli pension, je 65 jaroj. Oni devas pagi 50 kaj eĉ pli da jaroj, de kiam la malforta junulo venas en laborejo, por ricevi je aĝo, kiun nur tre malmultaj atingas, mizeran sumon da kelkdekoj da spesmiloj jare. La kotizon devas pagi la laboristoj, la mastro kaj la ŝtato.

La konsciaj laboristoj montris la malbonajn principojn de la leĝo kaj postulis forigon de la unua ĉapitro kaj modifon de la dua. Sed oni respondis, ke la leĝo devas esti bone aplikata!

Lasttempe la kontraŭstaro de la laboristoj fariĝis pli energia kaj la ĝenerala sindikata komisiono dissendis ĉie protestojn kaj ellaboris memoron prezentotan al ministro por industrio kaj al la parlamento. Ĝi estis subskribata, malgraŭ ĉiuj persekutoj kaj malhelpaĵoj, de 30.025 laboristoj. Post grandaj publikaj kunvenoj en la tuta lando kaj en Bukureŝti, ĝi estis prezentata, sed la reakciuloj ne volas atenti ĝin. Tial la agitado daŭros ĝis kiam la regantoj aŭskultos la voĉon de la laborista klaso, kiu nur produktas.

Striko en la petrolo-regionoj. — En la sama tempo, neatendite, la laboristoj el la petrolregionoj komencis moviĝi, kvankam la vorto organizado ne estis ankoraŭ penetrinta inter ili. Ekzistas en Rumanujo riĉegaj petrolregionoj, de kie internacia bando da kapitalistoj eltiras milionojn da Sm. Sed ju pli tiuj riĉaĵoj plimultiĝas, des pli la mizero pli grandigigas. Pro la malbonaj kondiĉoj en kiuj la petroleksplataĵoj oni faras, dekoj kaj eĉ centoj da laboristoj pereas en flamoj, sen ke la malsata kapitalismo kaj la registaro prenenu iajn protektadmezurojn. Ĉar sia sufero transpaŝis la limon, ili vekiĝis kaj tiel je unu mateno, post fajrego eksplodinta pro la abomenaj laborkondiĉoj, kaj kiu pereigis ankoraŭ kvin laboristojn, ili ne plu volis eniri la laborejojn; la striko estis deklarata kaj rapidege ĝi etendiĝis ĉie. Pli ol 6000 de laboristoj rifuzis plu labori.

Ekzistas ja leĝo pri la minejoj, sed ĝi tute ne estas respektata, kvankam ties oficistoj enkasigas sen labori gravajn salajrojn. Laŭ tiu leĝo la entreprenistoj okaze de morto pro akcidento, devas pagi al la familianoj de l' pereinta laboristo miloble la tagan salajron. Nu, per „la nova leĝo“ oni donas nur... 40 Sm.

Sed, krom tio, la tuta stato estas tiel malbona, ke oni ne povas ĝin priskribi en kelkaj linioj.

Post kelktaga striko, ili reprenis la laboron, kondiĉe ke kiel eble plej baldaŭ oni modifu la leĝon: se ne, tiam la striko rekomenciĝos.

EM. J. NICOLAU.

El Usono.

Geknaba parado je la 1a de Majo en Nov-Jorko. Lastan jaron por la unua fojo estis en Nov-Jorko

parado de geknaboj je la 1a de Majo. Ĉeestis pli ol 3000 gelernantoj el la publikaj lernejoj. Tiu parado estis aranĝita de k-do Joseph Jülich, instruisto de la Ferrera moderna lernejo kaj de „Mt. Morris socialista lernejo“. Je la parado ĉeestis ĉiuj socialistaj dimanĉaj lernejoj kaj la plej grandan kontingenton alsendis la Ĉeĥoslava libera lernejo kun pli ol 1000 geknaboj, vestitaj en ruĝaj gimnastikaj vestaĵoj.

La geknaboj forrestis el la publikaj lernejoj kaj poste ili kunportis senkulpigilojn de siaj gepatroj, kiuj skribis, ke ili havas la lan de Majo festtagon kaj ĉe tiu okazo ili volas ĝoji kun siaj infanoj. Ĉiuj lernejoj pardonis al la geknaboj. Nunan jaron oni esperas pli grandan parodon kaj ree la samaj instruistoj laboras viveme inter ĉiuj geknaboj, ke ili forrestu de sia lernejo kaj partprenu la parodon, kiu preterpasos la ĉi-tieajn religiajn lernejojn kun epigrafoj: „Ni ne volas kredi, ni volas scii“ kaj „Kredo estas blindeco kaj scio la povo“, „La policistoj estas la gardhundoj de la kapitalistoj“ k.t.p. La novjorkaj radikalistoj dezirus, ke eŭropaj radikalistoj imitu ĉi tiajn geknabajn paradojn.

K.

Respondoj kaj Protestoj.

La E.S.F.I.O. je la momento, kiam finiĝas la milito balkana-turka, konsideras ĝin ankoraŭ kiel krimo de la registaroj balkanaj, kiuj uzis la servojn de la pastraroj greka, serba, montenegra, bulgara, por prepari kaj instigi siajn popolojn al rabista milito;

bedaŭras, ke la balkanaj popoloj ne kontraŭstaris, kaj sekvis siajn reĝojn kaj pastrojn, partoprenante tiun krimon.

Kaj se, kiel ŝajnas nun timindeble, kiel ni antaŭvidis de la komenco, la balkanaj armeoj interbatalos pri la dispartigo de la landoj ŝtelitaj,

Esio konsideros tiun novan abomenindajon nur kiel meritita puno pri la diritaj krimoj,

kaj decidus uzi ĉiujn siajn fortojn por kontraŭstari la terurajn danĝerojn de tuteŭropa milito kaŭzota de balkanaj agadoj.

Pri spionado kaj pri la proceso de franca kooperativo socialista kontraŭ laborista organo (I.S.R. 1 Aprilo paĝ. 84). Jen unu el tiuj tiel ofte ripetitaj eraroj, ke oni povas pensi ilin intencaj.

False estas, ke la societo kooperativa „La Bellevilloise” procesis kontraŭ „La Bataille Syndicaliste”. La vero estas jena: Oficistoj maldungitaj de la societo imagis rakonton de denunco de la flanko de alia oficisto. Enketa komisiitaro deklaris falsa tiun imagaĵon, kaj la oficisto, kulpigita de siaj ekskamaradoj, procesis mem kontraŭ „Bataille Syndicaliste”, kiu akceptis kaj publikigis tro facile tiujn falsajojn.

Aliparte vere estas, ke la konsilantaro de „la Bellevilloise” citis, antaŭ la tribunalo, la gazeton anarĥistan „Le Liberaire”, kiu per serio da artikoloj deklaris malhonestaj tiujn, kiuj direktas „La Bellevilloise”.

Nia honesteco estas ofte proklamita de lojalaj kontraŭuloj, kaj ni ne povis ne atenti la agadojn de tiuj, kies ŝajna tasko estas: detruigi per ĉiuj rimedoj la organizaĵojn laboristajn.

HENRIOT, administranto de „la Bellevilloise”.
Membro de la Esfio.

Pri kolonio en Brazilujo. En duonaprila n-ro k-doj Strasser kaj Fratecano kritikis kaj protestis kontraŭ la tradukaĵo de la alvoko farita al la laborista gazetaro de la organizaĵoj laboristaj brazilaj. En mallonga respondo — pro manko da spaco en I. S. R. — mi diris: „Mi uzis Esperanton por traduki malesperan alvokon de Brazilaj laboristoj, por ke ĉiu sincera k-do sciu la situacion teruran faritan de la mastroj kaj registaro de tiu lando; mi konsideras, ke nur Braziloj estas kompetentuloj, ankaŭ mi ne diskutos kun alilandanoj tiun temon, ĉar ili, nek mi, konas la aferon tiel bone kiel la loĝantoj mem! Mi nur opinias, ke estas tute neeble, starigi liberan kolonion en malliberega lando. Ke, laŭ mia konkludo, ĉiu estonta brazilano informiĝu rekte ĉe la laboristaj organizaĵoj de Brazilujo, antaŭ ol riski, eble, sian vivon. Mi plenumis mian laboristan esperantistan devon, mia konscienco estas trankvila! Kaj mi subskribas

T. M. STRUB, sekretario de sekcio de „Liberiga Stelo”
en Sotteville-les-Rouen. Adreso: 77 Rue Lafayette-
Rouen, Franclando.

Al Esfio (I. S. R. 1 Aprilo paĝ. 94). 1e. „La diskutado de l' projekto ne okazis en la armea komisiio!”

Tia estas la opinio de s-ro Dunois. Sed ni konsideru la veron. Dunois ĝin forgesis pro intima amikeco al s-ro Roblin, sekretario de la armea komisiio. Li devis pro tio forlasi la redakcion de „La Bataille Syndicaliste”.

Kiam s-ro Berry proponis sian projekton li diris: „Estas kulpo, kiun oni forgesis en la leĝoj de 1905 kaj 1910: estas tiu, kiu koncernas la insulton al nia standardo, la anti-militarismo 1) propagandon k.t.p.

S-ro Betoulle, socialisto, proponis, ke la projekto estu alsendata al la armea komisiio. Li diris: „Vi povos tiam diskuti la demandon en ĝia tuteco.” (Aplaudoj socialistaj). Journal officiel paĝoj 3456 kaj '57.

Se ĝi ne estis diskutata, ili sciis ĝian ekziston.

2e. La surprizo estas malbona senkulpigo, oni sciis la ekziston de tiu leĝo, kaj la deklaron de Berry. Cetere, la deputitoj diras, ke ili estas ĉe la parlamentejo por zorgi pri la aferoj. Ili do ronkas? Ili estas neutilaj en ordinara tempo, kaj malutilaj en kelkaj okazoj. Ili sankcias, laŭ ilia diro, plej gravajn aferojn, kun oreloj ŝtopitaj!

3e. Estas mensogo diri, ke Compère-Morel sankciis la principon.

Li mem en sia respondo (I. S. R. paĝo 18a): Nun necese estas, ke oni estu dufoje kondamnita, por ke la leĝo frapu k.t.p.

Girard skribis (I. S. R. Dec paĝ 134a): „Hodiaŭ la principo de tiu malnobla leĝo estas akceptita... estas nur sur konsidero de pli aŭ malpli, ke ĝi estis atakita”.

Kiel! la anarkiistoj 2) ne legis la proponon de Compère-Morel? Ili ĝin bone legis, kaj la tutan aferon, eĉ kontraŭ la volo de Dunois. Oni vidis komence kial.

Compère-Morel lasis nenion ekzisti en la leĝo, kio koncernas antimilitarismojn kaj ribelon. Estas vere. Sed li tamen montris al la registaro ke li kaj liaj sampartianoj malaprobis tian propagandon. Tiam la registaro komprenis, ke ne estas grava kontraŭstaro.

Efektive, por subteni la forigon de la unua artikolo, la socialistoj ne diris unu vorton. Tial la sukceso!

Sed se li petis la forigon de la 1a art., li lasis la duan, kiu estas kontraŭ la senlaboruloj.

Ĝi diras, ke tiuj, kiuj estos vagantaj, almozetantaj, kaj punitaj ĝis 8 monatoj da malliberejo, iros al afrikaj taĉmentoj. Compère-Morel skribis en sian projekton pri tio.

Tie, ni ne proponas modifojn, sed ni observ-

1) Ĉu anti estas permesata afikso?

2) Ĉiuj vortaroj donas anarĥ...; ni atentu niajn vortojn!

igas, ke tiom longe, kiom la leĝo estos ne preninta rimedojn por kontraŭbatali la senlaboracon, la tuta leĝoscienco haltiga de la vagado kaj almozpeto mankas da racia justigaĵo, kaj da praktika efikeco.

Li sciis bone ke tio estis kontraŭ la laboristoj, junuloj de 15 ĝis 20 jaroj, ne trovintaj laboron, kaj malsataj.

Se la socio ne protektas la senlaborulojn, kial sankcii — ne proponante modifojn — tiun parton de la leĝo?

Girard estis do prava kiam li skribis: „Cedajo, iam fordonita, akiras baldaŭ principforton; rezultas el tio, neeviteble, modus vivendi, kiu daŭradas kaj kies modifo iĝas tiel malfacila, kiel estus ĉe la komenco, ĉiu malhelpajo je ĝia starigo”.

Kaj pli poste: „Tamen tio estas fakto oftfoje elmontrita de historio, ke se oni cedas al la registoj colon da terajo, ili baldaŭ prenas centon. Kaj la lastaj rimedoj malestimindaj de kiuj petas helpon al la artifikoj de la politiko, estas konsekvence malfermintaj, oni volu aŭ ne, la liberan kampon al la malamikaro, permesante al ĝi, dank' al la cedajoj eltirigitaj, ricevi sanktigon de la principo, kies ĝi faros subpremgilon... nenio devas esti cedata al la registaro, kiu ne ĉesas spioni okazon por plimalfortigi nin aŭ nin venki. Estas metio de trompito ekinterkonsenti kun ĝi”.

4e. La demando ne estas tia. Estas pri la principo kaj la lastaj rimedoj!

Mi esperas, ke tio estos sufiĉa por montri ke tiuj, kiuj ronkis, serĉis elturnigaĵon, por malembarasigi sin. Ili faris ion — malfrue — sed ne sian devon. A. PANLOU.

Ne mortigema al soc.-dem. K-do Kolthek respondigas je la noto (I. S. R. 1 Aprilo paĝ. 88): „Kun iom da miro mi eksciis la noton sub artikolo el Aŭstrujo, en kiu vi faras tute neveran sciigon pri tio, kion mi skribis, ĉar vi silentis tion, sur kiu mi bazis mian konkludon. Mi ja skribis tutklare, ke, *kiam* estas vera, ke Kunĉak de socialdemokrataj metiunioj estas persekutita kaj senpanigita pro tio, ke li ne volis aliĝi al tiu metiunio; *kiam* al li pro tio estas neobligite trovi konstantan oficon, ke *tiam* mi aprobas lian faron. Kaj mi aldonis, ke tiam mi aprobas la mortigon ĉar en tiuj cirkonstancoj ne ekzistas alia rimedo por akiri rajton, ĉar tia senpanigaĉo ne povas esti persekutata per la punleĝo, eĉ se oni je helpo volis alvoki la klasjuĝecon.

Mi do ne nur demandis pri la ago de Kunĉak, sed pri ĝia kaŭzo, kaj mi ĝin trovis en la netolerebla tiranado de

l' metiunioj social-demokrataj, kiu kaŭzas agojn kian tiun de Kunĉak, kiel ajn teruraj kaj malaprobindaj je si mem.

Vi prezentis mian artikolon, kvazaŭ mi, sen pli, estus aprobanta kaj instiganta al embusko-mortigo je social-demokratoj. Kontraŭ tio mi protestas ĉiuforte kaj fidus, ke tiun proteston vi alportu sub la okuloj de la legantaro de I. S. R.

Ĉio, kio poste pri tiu okazo estas publikigita, ne ŝanĝis mian opinion, ĉar efektive estas almontrita, ke Kunĉak estas pelita kiel sovaĝa besto.

Vi ankoraŭ povas aldoni, ke poste mi skribis en „De Gemeente-Arbeider” (La Urba Laboristo), ke ĉiumomente la social-demokratoj povas disponi je mi, por publike defendi mian vidpunkton, sed ke ĝis nun tion neniu estas uzinta.

H. KOLTHEK JR.

Nota. K-do Kolthek do akceptas mortigon en la ekonomia milito. Mortigo estas, laŭ li, malaprobinda en si mem. Sed, se oni ĝin aplikas al tirana soc.-dem., tiam mortigo havas lian aprobon. Por li, ĉiu soc.-dem. estas tirano — la soc.-demokratoj do komprenas, ke, malgraŭ lia ĉiuforta protesto, ili ne estas tute ekster danĝero por lia venĝanta ponardo. Kaj, eble, estas ankoraŭ aliaj tiranoj, ekster socialdemokratio. K-do Kolthek, sendube, ne tiom malamas ĝin, ke li eksklusive al ĝiaj anoj deziras apliki la mortpunon... kie estas la fino?

Jen sekvas kelkaj frazoj el la artikolo de k-do Kolthek: „Se iu estraro kuraĝus nin senpanigi pro tio *), tiam ĝi povus atendi nian sangan venĝon. Forigo de tiaj tiranoj estas bonfaro al socio kaj homaro. Tia metiunio **) estas pli malbona ol ekspluatado de kapitalismo. Pli baldaŭ ol ni kuraĝis esperi (ni akcentas tiun esprimon, Red.), tia mortigo okazis (tiu je Schumeier). Se la aferoj estas tiel (nome kiel la kontraŭ-soc.-dem. gazetoj rakontas, Red.), tiam tiu metallaboristo (Kunĉak) agis bone. Kontraŭ tia taktiko ĉia rezisto estas permesata, ankaŭ persona perforto. Pro sia propra intereso, pro memdefendo, la laborista movado havas la devon sin turni akre kaj fortike kontraŭ soc.-demokratio kaj

*) „Tio” estas: pro spioni en la metiunio, kalumnii ĉion kaj ĉiun, suspektigi ĉion kaj ĉiun, kaŭzi senfinan malpacon, krei atmosferon de malfido kaj de malica pasio en la metiunio.

**) „Tia metiunio” — tio estas: metiunio, kiu ne deziras toleri la cititon sub *).

la „moderna”, t. e. soc.-dem. metiomovado. Tion ĉi konservu en memoro. laboristoj en Nederlando”.

Jen do: la soc.-dem. metiunioj persekutis Kunĉak; tiu ĉi mortigas Schumeier, kiu estis persone senkulpa pri tiu persekutado. Laŭ Kolthek, Kunĉak agis bone! Se A faris krimon, sed ne estas trovebla aŭ neatingebla, tiam punu por tiu krimo B aŭ C aŭ D, laŭ la hazardo! Tio ŝajnas sistemo de justeco nerekomendinda!

En Nederlando kaj kelkaj aliaj landoj mortpuno ne plu ekzistas. En la ceteraj landoj ĉiuj progresemeloj postulas ties forigon. Sed k-do Kolthek ĝin deziras reenkonduki, kaj en ĝia plej sovaĝa formo, nome en la formo de la „lynch”-leĝo. Tia justeco estas pli malbona ol la justeco de kapitalismo!

Al la antaŭa noto ni povas ankoraŭ aldoni, ke Kolthek ne nur instigis ĝenerale, sed ankaŭ montras per la fingro tiujn, kiuj unue meritas esti forigita por la bono de socio kaj homaro, nome: la Nederlanda Ligo de Diamantistoj (8000 membroj), kaj la germanaj soc.-dem. metiunioj, ĉar ankaŭ tiuj „ofte faras tiel” (kiel la Aŭstraj soc.-dem. metiunioj, kies agoj igis Kolthek aprobi la mortigon je Schumeier).

K-do en Aŭstrio, informu nin. La klerikala kaj alia gazetaro de Eŭropo prezentas Kunĉak kia martiro de soc.-demokrata tiranado. Kiel estas kun tio?

ESPERANTA MOVADO.

Hungaruj. Inter la hungarlandaj socialdemokratanoj fondiĝis Esperantista Federacio, kiu celas organizi la hungarlandajn Esperantistajn samideanojn, kaj klopodos federaciigi kun la alilandaj socialistaj societoj.

La federacio akceptis la regularon de E. S. F. I. O.

Rumenuj. Bukaresti: La 9an de Marto, en speciala ĉambro de la socialista kaj sindikata klubejo, nova kurso por laboristoj estis malfermata. Partoprenis prok. 40 gekamaradoj. Ĉar la partoprenantoj devas esti organizataj en la sindikatoj kaj abonantoj al la oficiala organo de la soc. movado, la kurso promesas esti bone vizitata.

En la sama tago fondiĝis laborista esp. grupo por propagando de Esp. inter la socialistoj.

E. N.

Bohemuj. Plzen: Esperantista movado inter plzena laboristo sukcese progresas. Ĉi tiea grupo lab. Esp. okazigis 28an Januaron unuan jarkunvenon. Post unujara agado la grupo jam havas 70 membrojn. La grupo transloĝigis en ĉi tiean laboristan domon. Je kristnaska kaj paska lundo ĝi aranĝis amuzajn vesperetojn, kies programo estis plenumata, parte esperante kaj parte ĉeĥe de membroj de la grupo. Sukceso morala eĉ finanĉa estis bona. Elementan kurson sub ĝia zorgo gvidatan, vizitadas 20 partoprenantoj. La grupo preparas ekspozicion de esperantaj kaj tiucele petas gesamcelanojn pri sendado de diversaj il. poŝt. kaj esperantaj, speciale tiuj, kiu koncernas labor. esp. movadon al sekretario de grupo, por kio ĝi antaŭe dankas. Adreso: Vojtich Babicky, Plzen, Nepomucké 31, Bohemio. Gesamcelanoj estas ankaŭ petataj, se ili konas konvenajn monologojn kaj teatraĵojn, por sendi ilin aŭ informi la grupon pri ili.

Holando. Esperanto kaj Holanda anarĥiista movado. Sincere dirite, Esperanto inter geanarĥiistoj Holandaj ankoraŭ malmulte estas disvastigita. Multe da kaŭzoj malhelpis la progreson de Esperanto; eĉ la propagando de „Federacio de Laborist-Esperantistoj” ĝis nun ne akiris kontentigan sukceson. Sed ni tute ankoraŭ ne malesperas, sciante ke la ĉefkaŭzoj estas la tri jenaj: 1e. Oni konsideras Esperantan movadon esti burĝa afero; 2e. oni havas malbonan opinion pri la celo de Esperanto, ĉar ja multaj opinias, ke Esperanto celas malaperigi la vivantajn lingvojn kaj anstataŭigi ilin per si; fine, oni ne estas konvinkitaj pri la pruvita taŭgebleco de nia lingvo. Nu, ni propagandas daŭre kaj ni kredas certe venki la reakcieman malŝaton rilate al Esperanto. Ni laboras al nia afero. luktante ni sendube progresos kaj fine venkos. Ni ja scias, ke la internacia lingvo povas doni al nia movado tiom multe da profito, ke, se ni nur sukcesos konvinki la gekamaradojn pri tio, ili certe akceptos Esperanton.

Multmaniere mi jam provis propagandi por Esperanto kaj mi konfesas, ke estas malfacila tasko; mi preskaŭ staras sole, kaj la plejmulto el la eminentaj gekamaradoj ankoraŭ ne sufiĉe estas konvinkitaj. Ofte mi tradukas artikolojn interesplenajn Holande kaj enpresigis ilin en anarĥiista gazetaro, sciigante, ke mi tradukis ĝin el Esperanto. Ankaŭ mi jam skribis artikolojn por propagandi en almanako kaj gazetoj. Plie mi ĉiam preparolas nian aferon persone, kaŝante dum

la interparolado mian malbonan humoron, kiun mi akiras, aŭskultante al la „argumentoj” de la anarĥiistoj kontraŭ afero kiel la nia. Antaŭ ne longe mi demandis en I. S. R. simpatideklarojn por konferenco anarĥiista. Kelkaj kamaradoj bonvole sendis tiajn deklarojn. Ili estas legitaj al la konferenco kaj preskaŭ la tuta anarĥiista gazetaro, kiun mi legas, sciigis la ricevon de tiuj deklaroj. Al ili, kiuj sendis al mi ion por tiu ĉi konferenco, mi sincere dankas.

Ankaŭ mi propagandas Esperanton instruante kelkajn gekamaradojn. Fine, mi ankoraŭ raportas pri la jena: Dum sia vizito al Holando, mia rusa amiko kaj korespondanto Seidler, tenis paroladon por anarĥiista studado-klubo. Li paroladis en Esperanto dum preskaŭ plena horo, klare kaj belsone. Poste la parolado estis tradukata. La tuto faris grandan impreson al la ĉeestintoj kaj ili fondis klubon, kiu jam komencis lerni nian lingvon. Por la sama klubo mi kvar semajnoj antaŭe paroladis pri Esperanto. Do: teorio kaj praktiko estas montritaj al ili kaj tial nia sukceso. Per tiu ĉi gazeto mi dankas ankoraŭ nian amikon Seidler, instigante lin persistadi en la paroladado, ĉar li sendube fariĝas lerta paroladisto.

ADRIAAN KLOEK.

Lingvaj aferoj.

Mi ne volas partopreni en polemiko pri lingvaj aferoj, sed mi bone memoras, ke kiam mi unue legis la I. S. R.-on (mi tiam ne estis abonanto, kaj estis antaŭ ol nia nuna redaktoro prizorgis la gazeton), mi ofte cerbe baraktis kun vortoj ne troveblaj en iu Esperanta vortaro, aŭ eĉ en angla vortaro kaj ĉiu scias ke la lasta enhavas sufiĉe da vortoj.

Mi forte ne konsentas ke oni uzu „io” por finiĝo de lando kiel Italio, sed devas insisti ke oni uzu la formon laŭ la „Fundamenta Krestomatio” Italujo aŭ Itallando. En la Krestomatio nia kara majstro klare montras al ni kiel nomi landojn; vidu paĝon 14 F. K.: „Germanoj kaj Francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj”; paĝon 17: „La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo”.

Pro uzado oni kutime nomas du tri landojn laŭ ilia jam internacia nomo, kiel Ameriko, Holando, Finnlando kaj por nomi la enlandulojn de tiuj landoj uzas la sufikson „ano” kiel Amerikano, Holandano k.t.p. laŭ Krestomatio.

Pri ĉia lingvaĵo esperanta la fundamento devas esti nia gvidilo kaj ni restu fidelaj al ĝi tiukaze neniam okazos konfuzo.

Pri novaj vortoj. — Kompreneble, kiel en ĉiun nacian lingvon, enpuŝiĝos, laŭ bezono, novaj vortoj, sed antaŭ ol uzi ilin oni devas serĉi ĉu samsenca vorto jam ekzistas en nia lingvo aŭ ĉu la signifo povas esti esprimata per kunmetataj vortoj. Mia opinio ekzistas sufiĉe da vortoj en „Boirac” por ĉion esprimi; „kvereli” estas uzita de D-ro Zamenhof kaj troviĝas en Boirac; se aperis en nia gazeto „espluati” aŭ „eksplati” anstataŭ „ekspluati” oni povas facile rimarki, ke estas preseraroj.

Nia redaktoro devas zorgi pri vortoj; se vorto ne estas trovebla en iu el la ĉefaj Esperantaj vortaroj mi konsilas, ke li ne enpresigu ĝin en la Revuon, kaj por konservi al si la povon li devas presi sur la unua paĝo de la gazeto, kiel multaj aliaj redaktoroj faras:

„La redaktoro rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn”; ankaŭ: „Neniu artikolo aperos en la sekvanta gazeto se ĝi ne estas ricevata de la redaktoro antaŭ ol la 15a (aŭ 20a) de la monato”.

En la nuna numero de I. S. R. mi legas vorton ne troveblan en Boirac, Kabe, Millidge, Rhodes, aŭ la angla vortaro, t.e. „Katorgo”, paĝo 110.*) Ĉu tiu vorto estas necesa? Laŭ mi „ne”. Mi ne komprenas ĝian ĝustan signifon, nur divenas ĝin, kaj konjektas, ke multaj aliaj legantoj estas kiel mi mem, tial nia estimata redaktoro ne enpresigu ĝin.

Ĉio dependas de nia redaktoro, li devas nur permesi vortojn jam aperantajn en iu Esperanta vortaro, kaj se estas absolute necese uzi novan vorton fari piednoton enhavantan

*) „Katorgo” estas rusa *nomo* por speciala sistemo de malliberejo. La rusaj k-doĵ, ŝajne, opinias, ke estas necese, enkonduki ĝin en Esperanto. Cetero, k-do Y. proponas neĝustan sistemon: la vortaroj ne devas regi la lingvon, sed la lingvo regu la vortarojn — la vortaroj ne kreas la lingvon, sed devas esti ĉerpita el la lingvo. Krom tio, mi deziras deklari, ke mi rigardas min kiel unu el la plej konservativaj esperantistoj.

Fiksi nepran daton pri ricevo de artikoloj estas malfacila afero por organo, kiu ricevas artikolojn el ĉiuj anguloj de l' mondo.

En Eŭropo oni, plejfoje, povas sendube sendi antaŭ la 20a de l' monato. Sed ekster Eŭropo oni sendu, sen atenti daton. Kaj ankaŭ en Eŭropo oni tiam sendu, kiam tio konvenas, sed oni ne koleriĝu, se ĝia artikolo ne povas aperi tuj en la sekvanta numero.

RED.

la ĝustan signifon; se li nur uzos Italujo, Anglujo k.t.p. ĉiu raportanto faros same.

Antaŭ ol fini mi devas laŭdi nian estimatan redaktoron, li havas malfacilan taskon kontentigi ĉiujn legantojn. Certe sub lia gvidado, lastatempe nia Revuo pli bonstiligis; tial neniu ĉikanu kontraŭ li pro malgravajoj, sed helpu lin ĉiamaniere.

E. E. YELLAND

La Esfio.

Kunveno de la 20 de Aprilo 1913. — 3 paroladoj estos organizataj proksiman monaton.

La delegito en Frankfurto parolos pri la kongreso de la Germana Asocio: la diskuto pri la raporto kaj la rezolucio okazos dum la kunveno de junio.

La sekretario legas proteston senditan al I. S. R. de K-do administranto de la kooperativo „Bellevilloise” kontraŭ la asertoj presitaj en la no. de la aprilo.

Nova rezolucio kontraŭ la balkana milito estas aprobita. La kunveno de majo okazos la 18an.

La sekretario SENRONO.

BIBLIOGRAFIO.

Camille Aymonier, *Pri Esperanto*, Diskutado pri kelkaj ŝanĝoj de Ido proponitaj El franca lingvo esp. René Ferter Eldono de Esperantista Centra Oficejo, 51 rue de Clichy, Parizo Prezo fr. 0,75.

Esperanta Librejo de J. Akkerman, 4 Verwulft, Haarlem, Nederlando, eldonas Migrantajn Kartojn, taŭgajn por kvin landoj. Prezo: 10 ekz. 12 sd. (15 cendoj), 50 ekz. 50 sd. (60 c.), 100 ekz. 80 sd. (1 guldeno), kune kun la sendokostoj.

Nova eldono de I. S. R. — Jus aperis kvarpaĝa flugfolio: „La disdivido de la tero”. kun kvar ilustraĵoj. Prezo: 1 ekz. 0,021 Sm. (= 4 pfenigoj, 5 centimoj, ½ penny, k.t.p.); 12 ekz. 0,165 Sm. (= 32 pf., 40 centimoj,

4 d.); — 30 ekz. 0,415 Sm. (= 80 pf., 1 franco, 10 d.). Mendojn sendu al adm. de I. S. R.

KORESPONDADO.

Hispanujo: K-do K. Redondo, dez. kor. per il. pk. kun k-do el la tuta mondo; tuj kaj ĉiam respondos. Adreso: Verdi 15—4a—2a, Barcelona.

Germanujo: K-do G. Berggren, Priesstrasse 11, Lubeck, dez. kor. kun perfektaj k-do eksterlandaj. — K-do Otto Martin, Agnesstr. 24, Gera-R., dez. kor. — K-do R. Meyer, Rödelheimerlandstr. 24, Frankfurt a. M., kolektas naciajn kaj il. pk., gazetojn esp kaj glumarkojn de l' tuta mondo, escepte de Francujo, Rusujo, Aŭstrio kaj Anglujo; respondos ĉiam kaj eble tuj. — K-do R. Petschke, Breitestrasse 3, Cottbus, dez. kor. per il. pk.; ĉiam tuj respondos. K-do Joh. Faulhaber, Neugasse 111, Pegau i. S.; kun eksterlandaj gek-do per il. pk. — W. Trautmann, Ludwig Wuchererstr. 25, Halle a. S. — Otto Trautmann, Friesenstr. 23, Halle a. S., dez. interŝanĝi florsemojn kaj il. pk.; respondos ĉiam. — Karlo Nordt, Merseburgerstr. 150, Halle a. S. — Hugo Boost, Kl. Sandberg 18, Halle a. S. — C. G. van Asten, Lauchstädterstr. 4, Halle a. S. — Aug. Fuchs, Streiberstr. 27, Halle a. S. — K-dino Elsa Hesse, Streiberstr. 27, Halle a. S. — Paul Näther, Körnerstr. 20, Halle a. S. — Hans Raithel, Beucha i. S. — Otto Röhrer, Leipzig—Kl., Klingenstr. 33/II, precipe kun japanoj kaj ĥinoj. — Willy Winder, lignomodelfaristo, Neustr. 12, Bitterfeld, dez. kor. kun sammetianoj en ĉiuj landoj pri labor- kaj vivkondiĉoj, kaj kun gek-do, kiuj vizitos la 10an int. kongreson 1914 en Parizo. — Albert Schmidt, tanisto, Laasenerstr. 88 (aŭ 8), Gera-Reuss. — Otto Berger, Bäckerstr. 6/II, Halle a. S.

Hungarujo: K-do Turcsányi Istvan, Rozsa u 9 I 12/b, Budapest VII dez. kor.; li sendos tre belajn pk.

Francujo: Dez. kor. kun alilandanoj: Duchemin, 12 Rue Brémontier, Rouen. — Marcel Raulin, rue de Mulhouse, Le Havre. — Galliot, Rue Hyacinthe Ménagé, Sotteville les-Rouen (Seine Inf.) — Ĉu Karl Jost el Zurich riĉevis sendaĵon de Strub, ĉe Rouen? — G. E. Terruès, Kompostisto kaj

Karl Jost estas petataj sciigi siajn adresojn por propaganda afero al sekretario de sekcio de Liberiga Stelo, F. M. Strub, 77, Rue Lafayette, Rouen (Seine-Inférieure).

Aŭstrujo: Nova adreso de k-do A. Czubrynski: Dietla 88, Kraków. — K-do A. Nickl, Felberstr. 116, Vieno XIV, dez. Interŝanĝi pk. il. — K-do R. Tomiska, Wilhelmstr. 45, Vieno XII, dez. kor. per il. pk. (precipe naciaj kostumoj). — Gegrupanoj de grupo de Ĉ. L. A. E. en Plzen volas kor. kun gesamideanoj pri diversaj temoj. Adreso: Laborista Asocio Esperantisto, Plzen, Laborista domo, Poviczni ul. 8. — Vojtich Babicky, Plzen, Nepomucka 31, volas kor. pri labor-kondiĉoj de bakistoj kun bakistoj el tuta mondo per il. pk. aŭ l.

Nederlando: Grupeto da akuŝistinoj en Amsterdam dez. kor.: skribu al f-ino M. de Hartog, Vrolikstraat 187, aŭ al f-ino Wehrbein, Reinwardtstraat 20.

ANIAJ KALKULOJ. — En kaso la 28an de Februaro 172.75 guldenojn. Ni ricevis: en Parizo (en frankoj): Rioux 2.50, Serant 2.50, J. Habert 1.25, Raulin 2.50, Chaussegros 5, Foucaud 0.30, Cournelet 1.25, Deshays 2.50, Drudin 3.50; grupo „Fratego” Barcelona 3.50, Bedouin 2.50, Béraud 3, Liö. Stelo en Sotteville 2.50, vendo ponumere 1.60, kune 33.85 fr, = 16 guld. En Amsterdam: Schmiedel 3.57, Ede 1.81, Romeijn 0.97, Schneider 5.80, Benjowski 2.47, Bückler 1.18, Soc. Junaj Laboristinoj 1.21, Boothman 3.02, Schüttauf 3.60, Voigt 36.05, Zwart 0.65, Goodliffe 2, Mozer 2.59, Nieuwenhoven 1.20, Wiegink 1.10, Zimmermann 1.31, Süß 2.90, Wandert 1.98, Thielking 3.52, Regan 1.65, Wilken 7, Wischniewski 3.20, „Fratego” Vieno XVI 1.21, Seidler 5, Weber 15, Roth 8.60, Hyams 1.20, de Jong 3.30, Martinek 11.90, Dreyer 4.30, Berggren 1, Marković 3, Paulet 2.90, Costa 16.70, C. H. Parker 3.60. punumere 4, kune 170.49; entute 359.24 guld.

Elspezoj: en Parizo: sendo, kor. kaj diversaj 15.41 frankojn = 7.20 guld. Preso de 4a kaj 5a n-ro, sendo, korespondo k.t.p. 133.45 guld.; kune 140.65 guld.

Enspezoj . . .	359.24 guld.
Elspezoj . . .	140.65 „
En kaso . . .	<u>211.59 guld.</u>